CxEA-Retkomunikoj 3/2003

CxEA-retkomunikoj estas neregula retinformilo de Cxehxa Esperanto
asocioj por cxiuj interesatoj (ne nur siaj membroj) kaj vi ne nur
rajtas, sed ecx estas petataj disvastigi la informojn, precipe al
viaj amikoj kaj samideanoj, kiuj ne havas retaliron.

Enhavo:
1. Grava ekumena okazajxo en Prago
2. OSIEK-konferenco omagxos sian premiiton Eli Urbanová
3. CxEA-konferenco cxifoje en Litomyšl
4. Preparata verko pri interlingvistiko kaj esperantologio en la
cxehxa

1. GRAVA EKUMENA ESPERANTO-EVENTO EN PRAGO

dimancxe la 20-an de julio je 15:00 okazos ekumena Diservo
en Esperanto. La loko, pregxejo de St. Nikolao, cxefpregxejo de
Cxehxoslovaka husana eklezio, ne estis elektita hazarde. La
partoprenantoj post la Diservo havos okazon konatigxi kun ambaux
kolumbarioj (urnejoj) trovigxantaj en la pregxejo, kio estas
specialajxo cxe husanoj. Ili estas normale por turistoj neviziteblaj.
Kaj en unu el ili ripozas ankaux iama vigla esperantistino kaj
cxefdelegitino de UEA por Cxehxio Stanjo (Stanislava Chrdlová).

La Diservon gvidos komune katolika pastro Albrecht Kronenberger (DE),
remonstranta pastoro Gerrit Berveling (NL) kaj husana pastoro
Miroslav Nytra (CZ) kun laika helpo de Pavel Polnický (evangelia
eklezio, CZ).
Krome, dum la Diservo eksonos arioj en plenumo de oparkantistoj
Kateřina Kudláčková kaj Miroslav Smyčka. Orgenan akompanon ne nur de
operkantistoj, sed ankaux dum la tuta Diservo plenumos Blahoslava
Dvořáková, balet- kaj oper-repetitorino de la Teatro en Ústí nad=

Labem kaj sxtata operejo en Dresdeno (DE).

Kvankam la ekumena Diservo estas organizita enkadre de la OSIEK-
konferenco (rig. pli suben), gxin povas partopreni iu ajn sen ajna
antauxaligxo. Vi simle venu kaj gxuu gxin, se vi estas interesata.

2. OSIEK-KONFERENCO OMAGXOS SIAN PREMIITON ELI URBANOV=C1

La temo de cxijara Internacia Esperanto-konferenco de OSIEK estas
"Intimaj temoj en Esperanto-beletro". Gxin partoprenos kial honora
gasto Eli Urbanov=E1, al kies verko Hetajro dancas estis aljugxita
OSIEK-prenio en la jaro 2001. Dum la cxeesto de "nia Eli" estos
baptita ankaux sxia lasta verko "Rapide pasis la temp' ". El la
prelegantoj ni nomu almenaux konatajn auxtorojn kaj interpretistoj
Christian Declerck (BE), J.-L-Tortel (FR), Eugene De Zilah (FR),
Josef Doerr (DE), Gerrit Berveling (NL), Maria Butan (RO), sed
prezentigxos ankaux cxehxaj prelegantoj Vlastimil Kočvara (pri la
poemo Majo de K.H.Mácha), Jiří Patera (pri gastigurbo Prago),

Miroslav Malovec pri la verkaro de Eli Urbanová (kun cxeesto de la poetino preta subskribi suajn verkojn) kaj Petr Chrdle (pri siaj spertoj el profesia aplikado de Esperanto).

Eblas ankoraux aligxi cxe Petro Chrdle <chrdle@kava-pech.cz> aux cxe Zdeněk Pluhař <m.pluharova@worldonline.cz>. Aligxilon oni povas trovi sub http://www.kava-pech.cz/osiek. Lastmomente ni sukcesis rezervi ankaux tre favorprezajn studentajn hejmojn en proksimeco kaj ankaux estas speciala rabato por Cxehxoj, Slovakoj kaj la ceteraj ekssocialismaj landoj (nur CZK 1000, do ekvivalento de EUR 34.-). Sed pro neceso fermi la mendojn de tranoktado bv. aligxi kiom eble tuj.

3. CxEA-KONFERENCO CxIFOJE EN LITOMYŠL

Litomy=B9l estas ne nur famkonata en Esperantujo pro Litomisxla tombejo de Karolo Píč (cetere, en gxi li estas nun entombigita), sed ankaux gxenerale por siaj beleco kaj historia valoro (pro kio gxi estas envicigita en la liston de kulturaj heredajxoj de Unesco). Kaj en cxi tiu pitoreska urbo, en bonkvalita hotelo kontraux nekredeble favoraj kondicxoj okazos cxijara konferenco de CxEA, kiu havos krom labora parto ankaux ricxan turisman kaj kulturan parton. Kvankam la aligxilo aperos en Starto nur en venonta Starto, bv. nepre noti jam nun en sian kalendaro la daton de la konferenco: 17.-19.10.2003

4. PREPARATA ELDONO DE VERKO PRI INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO EN LA CxEHxA

La verko de Detlev Blanke Interlingvistiko Enkonduko en la fakan literaturon aperos en la cxehxa danke al la eldonejo KAVA-PECH. Gxin tradukis Miroslav Malovec, kiu ankaux aldonis cxapitron pri la situacio en Cxehxio kaj oni supozas, ke la verko ekaperos sur la bretoj de cxehxaj librovendejoj dum cxijara auxtuno. Estas post longa tempo verko, kiu povas bone informi la cxehxan publikon pri Esperanto en kunteksto de interlingvistiko. Tamen, dependos de la aktiveco, cxefe demandoj de esperantistoj pri gxi,, cxu la librovendistoj efektive mendos gxin kaj cxu gxi do efektive estos ofertata en iliaj librovendejoj.